

Tarifon vidu sur lasta paĝo!

DUMONATA KOMERCA GAZETO DE ESPERANTO TRIUMFANTA

Redaktisto: HJ. Unger, Lausanne

Konferenco de Venezia.

La urbo Venezia ludis gravan rolon en la komerca vivo de antikva Italio. Sed iom post iom ĝi devis cedi al pli fortaj konkurantoj, kiujn la tutmonda komerca trafiko preferis pro pli favora situo: Genova kaj Napoli. Tiel la haveno de Venezia perdis sian iman gravecon, sed konstante ĝi penadis, konservi siajn noblajn komercajn tradiciojn.

Tial ne estas mirige, ke Venezia gastigis la Konferencon pri Esperanto en Komercio, Industrio kaj Turismo.

La „Itala Komercia Ĉambro en Svislando“ en Genève, kiu oficiale invitis al tiu kongreso kaj tre sincere helpis al ĝia sukceso, nun povas esti vere kontenta pri la elekto de tiu urbo kiel konferencloko. Kaj la loka komerca ĉambro kun la ceteraj aŭtoritatoj povas fieri konstati, ke la Konferenco, de ili noble subtenita kaj favorita, estas vera sukceso, jam pro la grandnombra partopreno el multaj landoj.

Efektive, en Venezia kunvenis delegitoj de 188 organizaĵoj de komercio kaj turismo el 21 landoj de Eŭropo, Ameriko, Azio kaj Afriko; inter ili la registaroj de Germanio, Jugoslavio, Polio, Rumanio kaj Ĉeĥoslovakio. Krom tio la delegitoj de la foiroj de Barcelono, Bordeaux, Breslavo, Budapest, Frankfurt, Helsinki, Lausanne, Leipzig, Lubjana, Malmo, Milano, Padova, Paris, Praha, Reichenberg, Valencia kaj Zagreb havis apartan kunvenon. Al la Konferenco, tiu foira delegitaro prezentis valorajn raportojn pri la uzado de Esperanto por la internacia reklamo, pri la atingitaj rezultoj kaj pri la spertoj, faritaj kun Esperanto en korespondado kaj interparolado kun eksterlandaj vizitantoj.

La komerca ĉambro de Paris prezentis al la konferenco rezolucion, kiu rekomendas la instruadon de Esperanto en ĉiuj komercaj lernejoj de la mondo kaj deziras ĝeneralan uzadon de tiu lingvo en la internaciaj interrilatoj de komercio kaj turismo.

La delegitoj de la komercaj ĉambroj de London, Pekin, Tien-Tsin, Brno, Budapest, Calais, Lausanne, Lugano kaj de multaj aliaj urboj en dek-kvino da landoj subtenis tiun rezolucion, kiun la kongreso fine akceptis unuanime kun la kompletigo, proponita de la komerca ĉambro de Milano, rekomendanta al dubantaj institucioj, serioze studi la demandojn kaj prove uzi Esperanton anstataŭ resti ne-aktive indiferentaj.

La rezolucioj de Venezia proponas:

1. ke Esperanto estu instruata en la komercaj lernejoj de la tuta mondo;
2. ke Esperanto estu ĝenerale uzata por la eldono de komercaj reklamiloj;
3. ke la turismo uzu ankaŭ Esperanton por siaj publikigaĵoj;
4. ke Esperanto estu akceptata kiel internacia lingvo en la radiotelegrafio.

Jen bela rezulto de kelktaga laborado! Baldaŭ oni havos franclingvan protokolan raporton pri la Konferenco, kaj espereble sekvas tradukoj en aliaj idiomoj. Tiu raportoj estas tre grava dokumento kaj p'el efika propagandilo. Se ĝis hodiaŭ oni nur malfacile kaj penegre povis sukcesigi Esperanton en komerca kaj turisma sfero, tio ne plu estas direbla hodiaŭ: la faka Konferenco de Venezia evidente montris la praktikan valoron de Esperanto kaj pruvis, ke Esperanto — serioze — ne plu estas rifuzebila!

Raporto pri Venezia.

Nia legataro sendube miras, ĉar ni ne publikigas longan protokolon pri la Konferenco de Venezia. Nu, estis UEA, kiu kunvokis, aranĝis kaj sukcesigis tiun Konferencon. Lojale ni deklaras, ke apartenas al la organo de

La kulturo de rozoj kaj la rozolea industrio en Bulgario.

Rozoleo estas ekstrakto aŭ esenco el rozfloroj. 2600 kilogramoj da ili donas 1 kilogramon da rozoleo. La floroj estas pagataj po 4 levjoj por la kilogramo. Al tiu prezo oni devas aldoni la kostojn de la ligno por hejtado de la distilaj aparatoj, la salajrojn ktp., kiuj nun ne estas malgrandaj.

La rozokulturo en Bulgario, kiu troviĝas sur la sudaj deklivoj de la centra Balkano apud Karlovo kaj Kazanlik, estas ne nur unu el la plej malnovaj kaj profitaj industriaj branĉoj, sed ĝi ekzistas preskaŭ tute nur en Bulgario. Tie la rozoj estas kulturataj sur vastaj kampoj. En Grasse kaj Cannes, en Militz apud Leipzig kaj en Sparta proksime de Smyrna oni kulturas rozojn por la sama celo sed ne tiom sukcese. La loko tie estas tre limigita, kaj la rikolto malpli granda. Krom tio oni bezonas en Bulgario 2800—2600 kg. da floroj por 1 kg. da oleo, dum en Malgranda Azio kaj Francio estas necesaj 3600 kg. da rozfloroj. Pasintan jaron la rozoj kostis en Francio 8 frankojn po kilogramo kaj en Bulgario nur 1 frankon. Kaj fine, la anatolia kaj franca rozoleo havas ja tre ĉarman kaj agrablajn aromon, sed mankas al ĝi la forto kaj abundeco de la odoro kaj ankaŭ la mirigaj konstantaj ecoj, kiuj famigas la bulgaran rozoleon.


En Bulgario estas kulturataj nur du rozaj kvalitoj, la t. n. Damaskus-Rozo

(*rosa damascena*), rozkolora, kaj la blanka Moskva Rozo (*rosa muscata*), malpli forta sed riĉa je sterioptol.

La rozolea industrio datas jam de 200 jaroj en Bulgario kaj etendiĝas sur 180 vilaĝoj kun pli ol 20000 malgrandaj posedantoj de rozogardenoj, de kiuj ĉiuj havas proksimume unu rozan

(*rosa damascena*), rozkolora, kaj la blanka Moskva Rozo (*rosa muscata*), malpli forta sed riĉa je sterioptol.

La rozolea industrio datas jam de 200 jaroj en Bulgario kaj etendiĝas sur 180 vilaĝoj kun pli ol 20000 malgrandaj posedantoj de rozogardenoj, de kiuj ĉiuj havas proksimume unu rozan



Kulrado de la rozoj.

kampon krom siaj agrikulturaj kampoj por la vivo necesaj.

La rikolto estas jare unufoje, ordinare en la fino de majo, kaj daŭras 2—5 semajnojn.

La oleo estas elirata per distilado, ĉe la vilaĝanoj en malgrandaj primitivaj kaldronoj kaj nun pli ofte en modernaj grandaj aparatoj.

La rozolea industrio montris deponi la jaro 1885 ĝis 1918 konstantan altiĝon.

La komisiono de la reprezentantoj el komercio, industrio kaj financo por komuna agado ĉe siaj registaroj. La rezolucioj de Roma estas do nur la unua paŝo al efektiva maturaĵo de maturigintaj ideoj. En Roma oni ja tuj povis konstati malpliĝon de naciaj kontrastoj, de nacia rivalaĵo, kaj pli granda tutmonda solidareco. Jen esperiga signo por pli bona estonto, libera de ŝovinismo.

El la longa listo de la traktatoj ni elektas la plej gravajn.

La kongreso kreis tri komisionojn, kiuj okupiĝis pri financaj aferoj, komercio kaj industrio, transporto.

La ideoj de la komisiono por komercio kaj industrio havas tute specialan intereson, ĉar la Internacia Komercia Ĉambro la ludos ne malgravan rolon en la Dogana Konferenco, kunvokita de la L. d. N. por oktobro 1923. Unue ĝi ektrankas la demandojn, kiel devas esti dogane taksataj tiuj varoj, kiuj estas ekspeditaj ĵus antaŭ la plialtiĝo de dogana tarifo. Kiajn konsekvencojn havas tia plialtiĝo por kontraktaj antaŭe subskribitaj? En la diskutado partoprenis amerikaj, svedaj, svisaj kaj anglaj delegitoj. Fine oni rekomendis, studi en la apartaj landoj, ĉu ne estas eble, taksati laŭ la malnova tarifo (se tiu estas pli favora) ĉiujn varojn, kiuj estas efektive ekspeditaj antaŭ la leĝigo de nova tarifo, kaj menditaj laŭ kontrakto farita sur la bazo de la malnova tarifo.

Rilate al la malpermesoj pri importoj kaj eksportoj oni decidis, ke la registaroj limigu ilin plej baldaŭ al minimumo. Kie tiaj malpermesoj ne povas esti tute nuligitaj, la kondiĉoj por havigo de permesoj estu klare publikigitaj, kaj la formaĵoj estu plejeble simpligitaj. Preskaŭ platona voĉdono traktas pri la fermo de la landlimoj kiel higiena rimedo, por malhelpi, ke tiu rimedo estu kaŝe aplikata por malhelpi la importadon. Aliaj rezolucioj okupiĝas pri la identecaj kartoj por komercvojaĝistoj, pri la doganado de specimenoj kaj pri la difino de la mallojala konkuro. Oni ankaŭ postulis la fiksigon de la Paska dato. Tre interesan proponon faris la angla delegito Sir Hobson pri la internacia komerca

La kulturita teritorio en 1889 estis proksimume 3000 hektaroj kun rikolto de 8 milionoj kg. da rozfloroj, kiuj donis 2400 kg. da rozoleo. En 1903 duobliĝis la kulturita tero kaj tiel ankaŭ la rikolto. Dum la milito la produktado malpli grandigis, pro urĝaj vivbezonoj, kaj malgraŭ la triobla demando al rozoleo esenco deponi la provizora paco, la produktado ne pli grandigis.

La nunaj novaj vivkondiĉoj postulas ankaŭ novajn plibonigitajn labormetodojn, kiun la registaro, la fabrikanteroj kaj vilaĝanoj rekonis, kaj jam la necesaj paŝoj estas farataj por rekonstrui la rozolean industrian sciencan bazon. En novembro okazos en Kalofer apud Karlovo kongreso de la rozoleo-produktantoj por prepari la novan leĝoprojekton pri akcelado de la rozolea kulturo kaj forigo de la falsigado.

Kie la rozoleo tiel abunde kreskas kiel en Bulgario, tie prosperas ankaŭ aliaj bonodoraĵaj plantoj, kaj se la modernaj bulgaraĵaj fabrikoj estos subtenataj per germana tekniko, franca tekniko, angla kaj amerika financa helpo, tiam la bulgara rozolea kaj plantolea industrio reprenos baldaŭ sian naturan kaj normalan disvolvigon kaj atingos unikan prosperon. Ĝi faros el la bulgara rozoleo ne nur floradon de la mondo, sed veran ĝardenon Edeno.

Ivan H. Krestanoff.

arbitracio. Laŭ la rezolucio akceptita, estus dezirinde, ke post la alvoko de la Internacia Komercia Juĝejo de la Internacia Komercia Ĉambro, ĉiu ordinaraj juĝeja procedo ĉesu, kaj ke la decidoj de tiu internacia juĝejo estu laŭleĝe akceptitaj en la tuta mondo.

La komisiono por transporto, prezidita de Sir Arthur Balfour, starigis studan komisionon por ĉiuj demandoj rilate al la transporto tra la aero. Koncerne la internacian reguladon de la repago-normoj ĉe averioj de varoj, la komisiono esprimiĝis favora al la reguloj de la antaŭmilita tempo. Plue oni atingis la konsenton pri nova regularo rilate al la uzado de la „Bills of Lading (received for shipment)“. La komisiono ankaŭ esprimis la deziron, ke ne nur la pasporta vizo estu forigata, sed ke ankaŭ la pasportoj ĝenerale ne plu estu postulataj. S-o Dake (U. S. A.) proponis la konstruon de grandaj aŭtomobilvojoj por faciligi la internacian turismon. Ankaŭ la „tunelo sub la kanalo“ (inter Francio kaj Britio) trovis multajn defendantojn.

En la financa komisiono s-o Paskiewicz (Suda Slavio) raportis pri la penadoj de sia registaro por stabiligo de la valuto. S-o Champagner (Polio) parolis pri la ebleco, interŝanĝi varojn kun la landoj kun malbona valuto. La ĉefan argumenton tamen prezentis la sveda delegito s-o Casse, kiu montris, ke vanaj estas ĉiuj provoj, radikale ŝanĝi la nunan diferencon inter la diversaj monvalutoj. Profesoro Casse kredas, ke la re-iro al la antaŭmilita kurzo estas dezirinda sole por tiuj valutoj, kiuj (kiel la angla) nur tre malmulte perdis. Por ĉiuj aliaj valutoj li rekomendas stabiligon sur la bazo de la nuna diferenco al la ora valoro. S-o Bianchini (Italio) proponis, ke unue oni atentu la sukceson de la reforma politiko ekonomia, kaj s-o Sarasin (Svislando) rekomendis la stabiligon sole por la landoj kun absolute senvalorigita valuto, ekskludante do Francion, Belgion, Italion kaj Ĉeĥoslovakion. Fine oni akceptis, post malgranda ŝanĝo, la tezon de profesoro Casse, lasante al ĉiu lando la liberecon, mem elektit oportunan aŭ favoran momenton por la stabiligo de sia valuto. La ceterajn

kunvenojn de la financa komisiono plengigis la diskutado pri la amerika projekto rilate al la militaj ŝuldoj, la ripara demando kaj la restarigo de la internacia kredito.

En la ferma kunsido de la kongreso oni laŭde menciis la solvon de la aŭstria problemo, kiel la modelon de grandskala saniga agado, kaj elektis s-on Booth kiel prezidanton de la proksima kongreso.

Fr. Isler.

Internacia Esperanta Kurso por Komercistoj.

La redaktisto de IK prezentis al la Komercia Konferenco de Venezia proponon, kiun ni jen publikigas en resumo, ĉar sendube ĝi havas ĝeneralan intereson:

1. Por doni al la Esperanta propagando inter komercistoj pli realan fundamenton, estus utile, aranĝi apartajn kursojn de Esperanto por komercistoj, komizoj ktp. La kursoj okazu en ĉiuj pli grandaj komercaj urboj de la mondo, komenciĝu plejble en la sama semajno kaj okazu laŭ komuna programo.

2. La „centro“ zorgu, ke listoj de la kursanoj estu interŝanĝataj internacie, por ke la kursanoj povu — ĉe la fino de la kurso — tuj uzi Esperanton por praktika korespondado pri fakaj aferoj, negocoj ktp. Tiu listoj enhavu ne nur la nomon kaj adreson de ĉiu kursano, sed ankaŭ la komercan branĉon, oficon, specialecon kaj ĉiun tel. utilan informon.

3. La adresoj estu komunikataj ankaŭ al „Internacia Komercio“, pro sendo de specimena numero. La legado de Esperanta gazeto estas la plej bona metodo, por eviti ne-interesiĝon de lernantoj pri la movado. Por fakistoj, la legado de faka gazeto estas absolute necesa.

Izolaj Esperantistoj aŭ grupoj ktp., kiuj deziras partopreni en tiu internacia agado, estas petataj, skribi al la redaktisto de IK.

„La Foiro de Lausanne“.

En Svislando okazas ĉiujare du foiroj: la unua printempe en Basel, la dua aŭtune en Lausanne. La „Svisa Specimena Foiro“ en Basel, lerte direktata de D-ro W. Meile, havas ĝeneralan karakteron, dum la „Comptoir Suisse des Industries alimentaires et agricoles“ en Lausanne estas speciala foiro por la nutraĵa kaj agrikultura industrioj.

La „4-a Foiro de Lausanne“ okazos de la 8.—23. septembro 1923. La haloj de la foiro estas plilarĝigitaj; vasta tereno estas rezervata por la ekspozico de agrikulturaj maŝinoj montrataj en funkcio. Interesa novaĵo estas la fako por eltrovaĵoj.

La „Foiro de Lausanne“ estis reprezentita en la Konferenco de Venezia, ĉar ĝi jam anoncis lastan jaron en Esperanta gazeto, laŭ konsilo de nia redaktisto. Por la nunjara foiro ĝi tre verŝajne uzos Esperanton pli vaste. Decido pri tio dependas de la Esperantistoj kaj ilia intereso por tiu foiro. Oni postulu do tiuj Esperantan partoprenon, skribante al la „Comptoir Suisse“, Lausanne.

La Printempa Foiro en Budapest.

La nuna malalta valuto de la hungara krono por hungarlanda eksporto povus esti tre progresiga, kvankam al la lando mankas multaj krudmaterialoj. Sed la hungara industrio produktas jam kelkajn ajonojn, el kiuj estas superfluo, kaj la eksporto de tiuj varoj pli faciligus la importon de materialoj necesaj por aliaj industrioj. Ĉefe agrikulturajn industriajn ajonojn kaj la necesajn ilojn por agrikulturo povas produkti la lando.

La Budapesta Komerca kaj Industria Ĉambro intencas per la nunjara specimenfoiro, kiu okazos de la 19-a de majo en la Industria Halo de Budapeŝto, aranĝigi la ekspozicion de hungara industrio por konigi ĝin al la hungara publiko kaj al la eksterlandaj reprezentantoj, alvokante la atenton de eksterlanda komercistaro al la eksportkapableco de nuna industrio hungara. Pri materialo kaj programo de la specimenfoiro nia kunlaboranto direktis demandon al gvidanta membro de la foirdirektantaro, el kies respondoj ni publikigas la jenon:

La fakto, ke Hungarlando transiris de la milita industrio al la paca industrio, do ke post pli ol kvinjara militinstrumenta fabrikado ĉiuj fabrikoj kaj laborejoj estas jam aliformitaj por pacartikla fabrikado, ebligis la atingon de grandproduktado. Kvankam ĉiu uzino, fabriko, laborejo devas lukti gigantan batalon kontraŭ la ĉiutaga pli forta ekonomia ruiniĝo, la produktado estas jam laŭ kvalito kaj kvanto rimarkinda kaj samranga kun alilandaj produktoj. El kelkaj artikoloj jam oni povas eksporti sen malvaroro por la helma neceseco.

Oni bezonis lokon, kie la publikeco povu atingi nian industrian, ja la valutaj diferencoj preskaŭ tute malebligas la importon. Do la Budapeŝta Komerca kaj Industria Ĉambro laŭ propra iniciativo decidis ĉe la Budapeŝta Specimenfoiro ebligi ekspozicion de la hungara industrio. Laŭ la ĝisnunaj notoj ĝi estos vere reprezentaĵo kaj grandmezura.

La celo de la Ĉambro estas ĉe la organizo de la foiro plej forte servi al la industria grandproduktado per la ordigo de la materialo kaj per la akiro de materialo. Hungarlando estas precipe agrikultura nacio, la vivkapableco montriĝas do per la kvalito kaj kvanto de agrikulturaj produktoj. La graveco de la ekspozicio estos la agrikulturaj maŝinoj, maŝinpartoj, helpinstrumentoj, kiuj plej grandparte estas la plej perfektaj kaj plej modernaj tipoj.

Grava afero estas, ke pro la konstanta ŝanĝo de la hungara valuto la direkto de la specimenfoiro fiksas kaj regulas la diversajn prezojn tiamaniere, ke ĉiuj ekspozantoj povas vendi kaj akcepti mendojn nur laŭ la prezoj montritaj en la oficiala foirkatalogo kaj eĉ submetas sin post la foiro al la prezequaligo de la Budapeŝta Komerca kaj Industria Ĉambro.

La Foiro disponigas per Esperanto apartan lokon, kie oni senpage elmetos ĉian Esperantlingvan komercan kaj vojaĝan reklamon aŭ afiŝon en kia ajn kvanto kaj kie la Esperantaj grupoj povas havi ĉiam deĵoranton.

„Ludo kaj Sporto“.

Grandstila ekspozicio de ĉio, kio rilatas al ludo kaj sporto en plej vasta senco, okazas en Dresden, de la 15. majo ĝis la 30. septembro 1923.

La ekspozicio havas kvar sekciojn: industrio (ludiloj, sportiloj, aranĝo de sportejoj), higieno, ekspozicio pri „ludo kaj sporto en ĉiuj epokoj“, kaj pri la „germana Kristnaska Festo“.

Krom tio, dum la ekspozicio okazos multaj sporto-konkuradoj: futbalo (piedpilko), skermo, bokso, laŭteniso, naĝo, remo ktp. Proksime de Dresden, apud la montara urbeto Geising, oni aranĝos flugojn per senmotoraj aeroplanoj.

Interesuloj skribu por pliaj informoj en Esperanto al la direkto de „Ludo kaj Sporto“ en Dresden (Germ.), Ausstellungs Palast.

Finnianda Foiro, Svisa Industria Kontoro kaj Esperanto.

La administracio de „Finnianda Foiro“ disponigas al ni kopion de francilingva letero de Bureau Industriel Suisse (Svisa Industria Kontoro) en Lausanne al la Foiro, kiu tekstas en la traduko:

Svisa Industria Kontoro Lausanne.
Oficejo de Informoj kaj Dokumentado por la evoluo de industrio kaj de interŝanĝoj.

P. 1382. M/G. Lausanne, 15. febr. 1923.
Grand-Pont 6.

Al la Finnianda Foiro de Specimenoj
Helsingfors.

Sinjoroj,
Rilatiĝante al nia letero de 28. novembro 1922, ni ebligas vin, ke nia kontoro translokiĝis kaj ke nia nova adreso estas 6. Grand-Pont, Lausanne, kaj ne Escaliers de la Grotte 1, Lausanne.

Aliparte ni permesas al ni konfirmi al via netaŭto pro sendado de viaj ĉirkueroj en nia fremda lingvo krom Esperanto, ĉar tiu helpingo ne estas uzata en nia lando. Ni preferas legi viajn komunistojn en sveda lingvo, se vi ne povas skribi al ni en angia, franca, germana aŭ itala lingvo.

Bonvolu akcepti, ktp.
Svisa Industria Kontoro
La direktoro La ĉefsekretario
(faksimilo) (subskribo)

La administracio de Finnianda Foiro aldonas ke, uzante Esperanton en sia reklamo kaj en ĝenerala pogrando inter-

naĉa korespondado, vi tion faras por simpligi la kontrolon pri sia korespondanta oficistaro, sed en bezono ankaŭ ne malŝatas uzi aliajn lingvojn. La administracio de la Foiro bedaŭras, ke ĝi en la letero de la Svisa Industria Kontoro devas substreki neĝustojn.

Jubilea Ekspozicio en Göteborg.

Göteborg, 12. majo. — Tiu havena urbo estas la dua en Svedio laŭ grandeco kaj la unua laŭ ĝia graveco por komerco kaj marŝipa trafiko. Antaŭ 300 jaroj, reĝo Gustaf Adolf fondis Göteborg-on, kiu havas gigantan havenon tute naturan. Modele aranĝita reto de fervojoj ebligas facilan atingon de la urbo; la trafiko estas tute internacia kaj donas al la urbo specialan karakteron.

La ekspozicio, aranĝita por festi la 300-jaran ekziston de Göteborg, montras tre bone la historian evoluadon de la urbo kaj de Svedio entute.

La inaŭguro de la ekspozicio okazis je la 7. majo; flagoj, ĉie videblaj, anoncis tiun feston. Matene je la 8-a h. oni aŭdis salutpafojn de la sveda artilerio kaj la sonoriloj de ĉiuj preĝejoj eksonoris: la reĝa familio alvenis.

Post la oficiala tagmanĝo, post paroladoj kaj festa parolado de la reĝo okazis la unua rondiro tra la haloj. Vespere, la oficialan bankedon de la urbo partoprenis pli ol 2000 invititoj, inter ili la diplomatoj.

La ekspozicio estas miksaĵo de orienta konstruaro kaj sveda arkitekturo. Majstra verko estas la granda halo, en kiu troviĝas la ekspozicio de la sveda eksporta industrio, pri kiu mi parolos en proksima letero. Por la internacia komercistaro tiu industria fako de la Jubilea Ekspozicio estas tre grava kaj instrua.

O. K.

Esperanto triumfas.

Sub tiu titolo ni legas en la aprila numero de la franca ekonomia kaj financa revuo „France-Europe-Orient“: S-o Letzgas, la sagaca eldonisto de la dumonata revuo „France-Europe-Orient“, kiu regule aperas de kvin jaroj, ĵus donis novan pruvon de la prizorgo, kiun li prenas por enpenetri pli kaj pli la francajn produktojn en la eksterlandojn.

Oni efektive opinias, ke en tia ekonomia situacio, kiam ĉiuj ŝtatoj nun trapasas, deponit la terura milito, oni devas uzi ĉiujn rimedojn por ĝin forigi kaj nenlun el la rimedoj uzataj de niaj konkurantoj preterlasi, por profite batali en la tutmonda komerca sfero.

Tial li ne hezitis por krei en sia oficejo 67, rue St. Lazare, en la centro mem de la medioj de eksportado kaj de importado, komercan oficejon, al kiu li aldonis Esperantan fakon, sub la titolo „Internacia Esperanto Komercita Oficejo“.

Kiel direktoron de tiu oficejo, kies gravecon konstato la industristoj kaj komercistoj, li elektis Esperantiston bone konatan de la tuta Esperantistaro, s-on Léon Méras, kies kompetenteco certigas la sukceson de tiu Esperanta fako.

Tiu ĉi organizo, ellaborita de kelkaj jaroj, nenion preterlasos, kio ne estos antaŭzorgita. Ĝi faciligas la rilatojn de la eksportistoj kaj importistoj el la Centra Eŭropo kaj el Ekstrem-Oriento kun la francaj eksportistoj kaj importistoj.

Nia oficejo interrilatos kun la foiraj kaj ekspoziciaj direktoroj tute elektitaj por esti kunlaborantoj. Ĝi havigos la plej bonajn kondiĉojn por ilia reklamo franca. Ĝi akceptos la aliĝojn de la francaj ekspoziciantoj, faciligos la sendojn de iliaj produktoj ekspoziciaj per la transportaj kompanioj kaj certigos al ili la plej bonajn prezojn kaj rabatojn por la afranko de iliaj presajoj.

Unuvorte, I. E. K. faros sian eblon por kontentigi siajn klientojn Esperantistajn aŭ neesperantistajn. Ĝi esperas trovi ĉe Esperantistaj eksportistoj kaj importistoj, fremdaj kaj francaj, la plej afablan akcepton, tiom pli, ĉar tia organizo korespondas al urĝa bezono kaj ĉar ĝi venas ĝustatempe.

Al ĉiuj niaj kolegoj de la gazetaro Esperantista aŭ neesperantista I. E. K. sendas sian plej koran saluton, kaj ĝi interŝanĝos sian revuon kun ĉiuj, kiuj ĝin bone deziras.

La komunikoj de la Esperantistaj grupoj estos afable akceptataj kaj publikigitaj laŭ ordo de la alveno kaj laŭeble.

Nia revuo (Esperanta fako) estos dulingva, por ke la legantoj neesperantistaj povu sciigi la komercajn informojn kaj kontroli la taŭgecon de nia bela helplingvo, por la tutmonda interkomprenado.

Programo de Agado en la Komerciaj Medioj.

La malfacileco de tiu agado devenas de kelkaj ĉefaj flankoj:

1. La komercistoj estas praktikemaj homoj. Nun ni ne povas promesi al ili grandan Esperantistan klientaron, ĉar la Esperantistoj estas tro malmultnombraj kaj ĝenerale malriĉaj. Ankaŭ ni ne povas promesi ke ili trovos multajn aliajn komercistojn, kun kiuj ili interrilatiĝos per Esperanto. Unuvorte nun Esperanto ne povas alporti tujajn profitojn kaj ni ne povas uzi tiun argumenton, tamen tiel potenca por praktikemaj homoj.

2. La komercistoj ne sentas akre la bezonon de internacia lingvo, ĉar, jam de longe, ili organiziĝis por malpligrandigi kaj eĉ preskaŭ nenigi la malfacilaĵojn devenantajn de la diverseco de lingvoj. Pro ekzisto de tiu organizo ili ŝancelas ŝanĝi ĝin aŭ eĉ aldoni al ĝi planan aranĝon por uzi Esperanton, kio efektive estas necesa, ĝis kiam tiu lingvo estos universe uzata.

3. Pli ol la aliaj homoj ili timas la molajn, kiujn ili ricevos de iliaj klientoj aŭ samprofesuloj pri afero, kiu, por multaj personoj, estas ankoraŭ utopio. Ili timas, ke tiu konstato malutilu ilin en iliaj profesiaj interrilatoj, kaŭzante, ke ili estu konsiderataj kiel neseriozaj kaj revemaj personoj.

4. Estante trege okupataj pri siaj aferoj, ili ne konsentas uzi tempon por detale studi la demandon, kiu aliparte estas tute ekster iliaj kutimaj pripensadoj, kaj kiam ili estas konvinkataj pri la taŭgeco de Esperanto, ili ne deziras serĉi kiamaniere ili devus realigi la uzon de la lingvo aŭ helpi ĝian disvastiĝon.

* * *

Niaj metodoj de propagando devas esti bazitaj sur tiuj ideoj. Ni ĉi sube klarigas ilin.

1. Agado sur la individuoj.

Kiam oni prezentas Esperanton al komercisto, oni ne devas promesi tujajn profitojn, oni nur klopodos por konvinki lin ke la uzo de la lingvo estos granda progreso, simila al tiu alportata de fervojoj aŭ telefonoj kaj realigebla ĉefe de la privata iniciato. Por kuraĝigi lin kaj pruvi, ke li ne estos sola subtenanto Esperanton, oni kongigos la jam ekzistantajn komercistojn aŭ firmojn, kiuj tion faras. Sed estas plej grave tre atenti, diri nur verajojn, ne citante nomojn, pri kiuj oni ne estas absolute certa; ĉar se la varboto serĉas pruvojn, kaj konstatas, ke oni ĉarigis lin, tio estos malbonega por nia agado.

Se oni konvinkas komerciston, oni tuj aldonos, ke li ne bezonas elspezi tempon aŭ monsumojn por helpi disvastiĝon de Esperanto, kaj oni kongigos al li la sekvantan programon, kiu konsistas:

a) aldoni sur ĉiuj iliaj leteroj aŭ reklamiloj, kiujn li sendas eksterlandan al klientoj aŭ korespondantoj la vortojn „Korespondas per Esperanto“ per malseka ŝtampilo aŭ presitajn.

b) inviti iliajn oficistojn lerni Esperanton, donante al tiuj, kiuj tion faros, diversspecajn avantaĝojn, ekz. pli bonajn notojn, pli fruktodonajn postenojn, ktp. Aliparte tiu bonvolo de oficejo montras, ke li estas inteligenta kaj iniciatema; sekve, per tiu metodo, la komercisto trovos la plej valorajn el siaj oficistoj, kaj tio estas ĉiam utila al firmestro. Kiam estos en la firmo Esperantista oficejo, li tradukos kaj respondos la korespondojn ricevatajn pro la invito montrita en la antaŭa paragrafo.

c) kiam estos kelkaj oficistoj posedantaj Esperanton, aldoni al la teksto de la afiŝoj montrataj en la magazeno, tradukon en Esperanto, kaj plej algiuj kelkajn afiŝetojn sciigantajn al la klientaro, ke troviĝos en la firmo Esperantaj interpretistoj.

Montrante tiun programon, oni klarigos, ke la celo estas montri al la neesperantistoj, ke la komercisto konsideras tiun lingvon kiel taŭgan kaj interesan ilon: tiu simpla konstato, se tiuj neesperantistoj faras ĝin en kelkaj gravaj firmoj, estas potenca propagandilo.

Ni supozis ĝis nun, ke la komercisto, kiun ni alparolas, ne volas fari multon por Esperanto. Se kontraŭe li intencas pli grave helpi la movadon, oni proponos la sekvantan programon:

a) publikigado de katalogo Esperante redaktita, kio montras plej grandan fidon en la sukceso de Esperanto.

b) organizado de kursoj por la oficistoj, ne por ke ili tuj uzu Esperanton, sed por prepari ilin al estonta uzado,

kiel oni aĉetas telefonon por uzi ĝin kiam tiu instrumento estos ĉie uzata.

c) monsubteno de la lokaj Esperantistaj grupoj, kaj aliĝo al UEA kiel Esperantia entrepreno.

d) agado en la asocioj de komercistoj, en kiuj ili partoprenas por helpi la agadon, kiun ni klarigas sube.

2. Agado ĉe la naciaj komercaj organizaĵoj.

Oni evitos la malfacilaĵojn devenantajn de la timo, kiun havas individuoj pro la mokoj, agente apud la organizaĵoj, kiel ekz. la ĉambroj de komerco kaj aliaj komercaj societoj. Efektive tiamaniere oni agas sur grupo, kies decidaj estas pli grandan forton kaj ne malkovras la individuojn.

Oni prezentos al tiuj societoj Esperanton kiel nur ilon teknikan, uzebian komence de la komercistoj inter ili; oni petos, ke tiuj societoj ne nur aprobu la aferon teorie sed pleie agu apud la oficialaj aŭtoritatoj kaj la aliaj komercaj asocioj.

Oni proponos al ili la sekvantan programon:

a) sendi al la oficialaj aŭtoritatoj deziresprimon, ke la instruo de la lingvo estu enkondukata en la teknikaj lernejoj kaj ke la registaro alprenu favoran sintenadon koncerne Esperanton. Nedubele estas, ke se la registaro ricevos multajn tiajn deziresprimojn, ĝi fine atentus ilin, ĉar ĝi komprenos, ke tio montras movadon de grava parto de la publika opinio, kio ĉiam impresas ĝin.

b) sendi al la komercaj organizaĵoj, ĉefe la komercaj ĉambroj, kopion de la deziresprimoj alprenita kaj inviti ilin atente ekzameni la demandon. Tio certe bone efikos, ĉar, kiel ni diris, en tia afero ekzemplo estas plej forta propagandilo.

3. Agado ĉe la internaciaj komercaj organizaĵoj.

Kongreso. — Plej bona okazo estas la internaciaj kongresoj, en kiuj la diverseco de la lingvoj kaŭzas akrajn malfacilaĵojn, kiujn ĉiuj facile konstatas. Oni sekve devas atenti pri la lokoj kaj datoj de tiuj kongresoj kaj klopodi por ke Esperantistaj komercistoj partoprenu ilin, ĉar agado de kongresisto estas plej efika. Tiuj kongresistoj prezentos proponon sub formo de deziresprimoj zorge redaktita kaj sendota al la registaroj de la diversaj nacioj reprezentataj en la kongreso.

Bona argumento estas neceseco de internacia terminaro. Oni montras ke, eĉ ne akceptante Esperanton, tiu jasko estas tamen plej utila; oni facile alprenigos Esperanton inter la lingvoj de tiu terminaro, montrante, ke per tiu metodo oni respondos tiun kontraŭiron, ke Esperanto ne estas taŭga, ĉar ne ekzistas Esperanta komerca terminaro; oni diros, ke tiu terminaro ekzistas virtuale kaj ke nenio estas pli facila ol fari ĝin, kiam oni konas la tradukon de ĉiu termino en la ĉefaj naciaj lingvoj, dank' al la principoj de la lingvo.

Internacia Ĉambro. — Inter la internaciaj organizaĵoj la plej grava estas la Internacia Komerca Ĉambro. Oni preparos agadon en tiu ĉambro

Komerca Leksikono.

La vortoj de tiu ĉi faka vortaro por komerco kaj tutmonda ekonomio rilatas al niaj specialaj artikoloj*). Ni preferas, doni la vortojn ne nur en vortaro, sed ankaŭ en artikolo, por ke ilia uzado estu praktikke montrata.

La bazo de tiu terminaro estas, kompreneble, la plej gravaj internaciaj vortaroj, tiuj de Boirac (Plena Vortaro), Kabé (Vortaro de Esperanto), Verax (Enciklopedia Vortareto) kaj, nature, la Zamenhof-a „Fundamento“ kun siaj „Oficialaj Aldonoj“.

Nia verko instigu niajn lingvajn kompetentulojn kaj precipe la fakistojn al profunda kunlaborado. Ĉiu Esperantisto, kiu havas ideon, proponon aŭ kritikon, sciigu tion al ni plej libere: ĉio estas zorge ekzamenota kaj laŭeble konsiderota, por ke fine ni havu tiun vortaron, kiun la Esperantistaro tiel urĝe bezonas: la komercan leksikonon, sen kiu ne estas eble, larĝe uzi Esperanton en la praktika vivo kaj instrui ĝin en komerca lernejoj!

*) En tiu-ĉi numero.

La signo (F) diras, ke la koncerna vorto estas trovebla en la Zamenhof-a „Fundamento de Esperanto“. Rapide oni konstato, ke tiu signo estas sufiĉe malofa.

La vortoj, klarigoj kaj tradukoj estas ĉerpitaj el nun preparata nova verko: H. J. Unger, Komercita Leksikono.

Aĉet-i (F), akiri ion, pagante monon (buy, acheter, kaufen, comprar, comprare).

adict-i, kalkule aldoni al nombro alian nombron; la rezulto nomiĝas sumo (add up, additionner, addieren, adicionar, addizionare).

administr-i (F), gvidi, direkti aferojn publikajn aŭ privatajn (administer, administrer, verwalten, administrar, amministrare).

adres-o, precize defnita loĝejo de persono [urbo, lando, strato kaj numero] (address, adresse, Adresse [Anschri], dirección, indirizzo).

pere de naciaj ĉambroj jam Esperantigitaj, kiuj prezentos proponon de studado de la demando.

Foiroj. — Grava ankaŭ estas agado apud la internaciaj foiroj, kiuj aliparte jam tre ofte akceptas kaj uzas Esperanton. Oni klopodos, por ke tiuj foiroj publikigu reklamilojn kaj afiŝojn Esperante redaktitajn kaj akceptu Esperanton inter la oficiale uzataj lingvoj. Oni provos havi specialan butikon por Esperanto en tiuj foiroj, kaj en ili oni disdonos propagandilojn speciale elektitajn por interesi komercistojn kaj montri al ili, ke jam multaj komercistoj ŝatas kaj uzas ĝin.

4. Agado ĉe la komercaj gazetoj.

Oni petos de la komercaj gazetoj, ke ili publikigu artikolojn pri Esperanto je la vidpunkto de la komerco. Se ili akceptas, oni petos iom pli, t. e. publikigado de oftaj aludoj al Esperanto por kutimigi la legantojn vidi tiun vorton kaj interesiĝi pri la afero. Ripetado estas forta reklamilo kaj ne multe kostas en tiu okazo. Se oni sukcesas, oni petos publikigadon de malgrandaj sciigoj pri la disvastiĝo de la lingvo en la komercaj medioj, pri ĝia konsiruo kaj ĝiaj principoj, fine de kelkaj artikoloj Esperante redaktataj.

5. Organizado de la Esperantistoj mem por la komerca propagando.

Inter la Esperantistoj estas multaj komercistoj aŭ oficistoj de komerco. Ili estas la plej bone difinitaj por la agado, ĉar la propagando farita de tiu specialisto en sia medio estas plej efika.

